Johann Wolfgang von Goethe,

Ergo bibamus!

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Jen ni kunvenintaj kun laŭdinda vol',
Pro tio nun: ergo bibamus!
Tintadas la glasoj, silentas parol',
Pripensu do: ergo bibamus!
Malnova ĝi estas kaj fortika dir',
Ĝi taŭgas por iu ajn plenkreska vir',
Kaj sonas eĥoe laŭ kora dezir',
Kunuloj do: ergo bibamus!

2. La sorto forvokas min el via rond',
Kunuloj, ho! Ergo bibamus!
Foriras mi sen granda havo al mond',
duoble do: ergo bibamus!
Ĉu avaregula amasas envi',
Do gajan junulon zorgigas neni',
ĉar unu l'alian ja helpas el ni:
Atestu per: ergo bibamus!

3. Pri la hodiaŭo, ĉu decas parol'?
Mi pensas nur: ergo bibamus!
Ŝanĝiĝo ja estas de l'mondo la rol',
Pro tio ja: ergo bibamus!
Eliras kunulo el urba pordeg',
La nuboj foriĝas pro suna la reg',
Jen ĝi la emblemo de nia ĝojeg',
Finkantu nun: ergo bibamus!

Traduko de la Germana poemo "Ergo bibamus!" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-85-170 (2003-11-10 08:49:29)

La latinaj vortoj "Ergo bibamus!" signifas: "Pro tio ni trinku!"
Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro "Esperantista Kantaro", kiu enhavas tradukojn de germanaj kantoj. La tradukoj estas faritaj de Ludwig Emil Meier. La libro estas eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann (Steglitzer Str. 44, Berlin, Germanio).

Johann Wolfgang von Goethe,

Ergo bibamus!

1. Hier sind wir versammelt zu löblichem Tun,
drum, Brüderchen, ergo bibamus!
Die Gläser, sie klingen, Gespräche, sie ruh'n;
beherziget: ergo bibamus!
Das heißt noch ein altes, ein tüchtiges Wort,
und passet zum ersten und passet so fort,
und schallet ein Echo vom festlichen Ort,
ein herrliches: ergo bibamus!

2. Mich ruft das Geschick von den Freunden hinweg:
ihr Redlichen: ergo bibamus!
Ich scheide von hinnen mit leichtem Gepäck,
drum doppeltes: ergo bibamus!
Und was auch der Filz vom Leibe sich schmorgt,
so bleibt für die Heitern doch immer gesorgt,
weil immer der Frohe dem Fröhlichen borgt;
nun, Brüderchen: ergo bibamus!

3. Was sollen wir sagen vom heutigen Tag?
Ich dächte nur: ergo bibamus!
Er ist nun einmal von besonderem Schlag,
drum immer auf's neue: bibamus!
Er führet die Freunde durch's offene Tor,
es glänzen die Wolken, es teilt sich der Flor,
da leuchtet ein Bildchen, ein göttliches vor,
wir klingen und singen: bibamus!

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22), publikigita 1810.*

Arg-85-169 (2003-11-10 08:11:56)

Die lateinischen Worte "Ergo bibamus!" bedeuten übersetzt: Drum laßt uns trinken!